

Johann Wolfgang von Goethe,  
Trovaĵo

*tradukita de Richard Schulz*

Mi vagis sola  
En la arbar'.  
Nenion serĉi  
Jen mia far'.

Enombre vidis  
Floreton mi.  
Lumanta stelo,  
Okulvizi'.

Al mi plukonta  
Jen ĝia vort':  
„Ĉu ke mi velku  
Al frua mort' ?“

Mi ĝin elfosis  
Kun la radik'  
Ĝin portis domen  
Al la larik'.

Replantis tie  
Ĝin en la fru'.  
Ĝi nun kreskadas  
Kaj floras plu.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Trovita

*tradukita de Antoni Grabowski*

Mi foje arbaron  
Promene eniris,  
Kaj serĉi nenion  
En penso deziris.

Mi vidis, en ombro  
Jen staras floreto:  
Steletoj lumanta  
Aŭ blu-okuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,  
Sed plure ĝi diras:  
“Ĉu por ke mi velku,  
Vi tial min ŝiras?”

Do mi ĝin elfosis  
Kun radikareto,  
Kaj portis al mia  
Ĝarden' ĉe l' dometo.

En loko trankvila  
Plantite karese,  
Ĝi kreskas, burĝonas,  
Kaj floras senĉese.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.*